



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1996 — 2

(APRIL-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... iom pri medicino kun Hipokrato



... Kaj iom pri mezepokaj poetoj kun Rutebeuf

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangoul)	2
Mezepoka poeto (S. Boniol)	3-4
Esperanto en Svislando (Golden)	5-6
Iom da medicino	7-8
Bohema tago (LN Newell)	9-11
La liberigo de la juĝisto (Szilagyi)	12-13
Por via Distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

En 11.04.1994 - Paul ARMA

Ĉi-kar-i mi-a ge-zi-gi-na kas-te-lo, ku-sas du nar-ces-toj.
So-me-re, ves-pe-re es-tas mal-fi-ci-le, ek-dor-mi traf-ki-le.

ple-naj da sa-noj... pro! no-no-to-na kant'.

Ta-men mi kom-pre-nis, ke sa-noj al-mi de-zi-ra-dis bon-ven-on en tiu kas-tel, i-li eĉ lu-la-dis min por ke mi son-ĝu pri no-va res-ta-do sub la ver-da stel'.

Esperantigis Marcelline
- Gramond -

ESPERANTO TRA LA MONDO

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ
DEKJARA - En 1985, la san-marina ministro D-ino Fausta Morganti, oficialigis la fondon de Akademio Internacia de la Sciencioj. De tiu dato, AIS ricevis oficialan agnoskon en Rumanio, Pollando kaj Ĉeĥio, okazigis en San Marino kaj aliaj landoj, studkonferencojn, universitatnivelaĵojn kursojn, studfinajn ekzamenojn, ĉiam kun uzado de esperanto. Lasttempe, AIS kaj la Pedagogia Altlernejo de Nitra, en Slovakio, subskribis kontrakton, kiu antaŭvidas la organizon de propedeŭtika lingvo-instruado, laŭ la metodoj de AIS, en Slovakaj bazaj lernejoj.
Ĝis nun AIS povis voki 250 sciencistojn el pli ol 50 landoj por honorofica kunlaborado.

ESPERANTISTO PREZIDANTO DE LA EŬROPA BUREO DE LA JUNULARAJ ORGANIZAĴOJ - Juna sveda studento, Ralf Gion Fröhlich, reprezentanto de TEJO, estis elektita kiel prezidanto de la Eŭropa Kunordiga Bureo de la Internaciaj junularaj organizoj. Li estis preskaŭ unuanime elektita pro la politike neŭtrala sintenado de TEJO. Li estas 22-jara studento pri politikaj sciencoj kaj internaciaj rilatoj. Li rajtos ĉeesti, kiel observanto, la parlamentajn asembleojn de Konsilio de Eŭropo.

EN BUDAPEŬTO - La 3-jara internacia kursaro koresponda celas doni lingvistikan bazon por la studado de la internacia lingva komunikado kaj okupiĝas pri diversaj terenoj de interlingvistiko kaj esperantologio. La tria jaro preparas por doktoriĝo. Postuloj por la kandidatoj: superagrada diplomo (min. bakalaŭro), bona lingvoscio. Du unusemajnaj restadoj, en septembro kaj januaro-februaro en Budapeŝto. Informoj: Esperanto-fako, ELTE BTK, Pf. 107, HU-1364 Budapeŝto, Hungario.

AMERIKA KONGRESO - Dum februaro, okazis la tria amerika kongreso en la kostarika ĉefurbo San Jose, ĉe la universitato, kun la temo: "Esperanto kaj la rilatoj inter nordo kaj sudo". Partoprenis 50 esperantistoj el 17 landoj, inter kiuj nia Grejziona amikino Paulette Naulet. La ministro pri edukado kaj altranguloj de la universitato ĉeestis la inaŭguron. La universitato cetere intencas enkonduki instruadon de esperanto.

LINGVOFESTO - En la franca urbo Tours, la

tie loĝanta usona esperantisto Dennis Keefe organizis gravan lingvofeston, dum kiu estis prezentataj, per fulmrapidaj kursoj, 67 lingvojn por preskaŭ 2 400 personoj. La esperantistoj disponis pri standoj kaj ankaŭ faris kursetojn por 67 ĉeestantoj. La esperantistoj Bruno kaj Maryvonne Robineau prezentis sian franclingvan libron.

EL HUNGARIO - La nuna mondĉampionino de ŝako, Zsuzsa Polgar, juna hungarano 26-jara, konas esperanton, kiel cetere ŝiaj du fratoj, Zsófia kaj Jutka. Krom tio, ĉiu parolas plurajn lingvojn. La patro, Laszlo Polgar, kiu instruis esperanton al ili verkis libron titolitan: "Eduku genion!".

NOVAJ LIBROJ - Oni eldonis en Ĉinio la unuan volumon (estos tri), de fama klasika literaturaĵo: "Ruĝdoma ŝonĝo", en traduko de Cao Kueqin.

Aperis en Hispanio "Lirikaj perloj de Al-Andalus" de Antonio Marco Botella. Estas, kun multaj komentoj, antologio de la poetoj de la muzulmana Hispanio (711 - 1492).

Nova libro de la bonega verkistino Spomenka Stimec: "Tena. Hejmo en Mezeŭropo". Rakonto pri la membroj de familio diversepoke.

"Plena poemaro 1917-1937", la plena verko de unu el niaj plej gravaj poetoj, Eŭgeno Miĥalski, ruso mortigita dum la stalina periodo.

"Dekameron. Unuaj tri tagoj". La fama verko de Boccaccio en traduko de G. Waringhien kaj Perla Martinelli.

"Ĥetajro dancas". Originala romano de Eli Urbanova, la ĉeĥa poetino.

DIVERSAĴOJ - Junaj francaj esperantistoj deĵoris en esperanto-stando dum "Expo-langues 96", en Parizo. Ili notis grandan scivolemon inter la vizitantoj.

Por la unua fojo la germanaj esperantistoj havis standon en la granda lerneja foiro Interschul, en Stuttgart. Pli ol 400 homoj enskribiĝis por la kursoj kaj cento da instruistoj interesiĝis pri la eblo mem instrui esperanton.

MEZEPOKA POETO

RUTEBOEUF

Por ekzakte loki la poeton Ruteboeuf en nia franca kulturo, ni memoru, ke la granda mezepoka literaturofonto de nia romaneca kaj lirika tradicio komenciĝas fine de la XII-a jarcento, kiam disfloradas la korteza kondutokodo. Ruteboeuf verkas unu jarcenton poste, sed la jubilanta homo de la antaŭa jarcento tute ne plu estas la sama tiutempe: ĉar meze de la XIII-a jarcento notindas grava ŝanĝiĝo: la tiamuloj faras al si demandojn pri la socio, lingvo kaj vivo. Filozofion de stabileco anstataŭas filozofio de nestabileco kaj metamorfozo. Tiu pridemandado haltas dum la XIV-a jarcento pro la militoj, epidemioj kaj sennombraj katastrofoj ĉiuspecaj, kaj rekomenciĝos sub Ludoviko la XI-a, dum la generacio de François Villon. Krome, inter la jaroj 1230 ĝis 1240 pli kaj pli regadas la potenca Inkvizicio kun la terura ekstermo de katarismo, kies naskiĝloko estas precize la provinco Champagne, ankaŭ naskiĝloko de Ruteboeuf. Poste venas la lukto kontraŭ la filozofojn, kiuj provas sintezon inter Aristotelo kaj kristanismo.

Se la pli granda parto de la vivo de nia poeto disvolviĝas en Parizo, gravas tamen lia devenloko, ĉar tie brilis literatura medio, kiu poste translokiĝos al la urbo Arras kaj regiono. Influite de tiu korteza tradicio, Ruteboeuf tamen revenos al la antaŭa idealo de kavalireco kaj kultos eposon. La ununura dato, pri kiu ni certas en lia vivo estas tiu de lia dua edziĝo (1260). Tiumomente li estas supozeble 20-aŭ 30-jaraĝa. Li supozeble (ĉiam nur supozoj...) naskiĝis en neriĉa medio; kredeble studadis la latinan por deĵori, ĉu en la reĝa aŭ episkopa administracio, ĉu ĉe nobelo kaj tie fariĝi ĵonglisto. En tiu epoko oni kalkulas multajn homojn tiajn, laŭlonge de la irvojoj vagantajn, ĉar ili ne kapablas trovi por si ĝustan lokon en la kadro de strukturita socio. Sed ili transdonas kulturon samtempe popularan kaj pli altnivelan, eĉ konsistigas mikshoman socitavolon, sed estas ofte taksataj supektindaj. La Eklezio emas ilin kulpigi pro mensogemo, diboĉo, drinkemo.

Kion signifas la kromnomo (eĉ moknomo) Ruteboeuf? Li estas tiu, kiu konstante vortludas, senfine ŝercas, subtakas la kortezan rafinitecon. Pro tio "rude" aŭ "rute" (t.e. kruda, abrupta). Li estas la ĝenulo, kiu eldiras neplaĉajn veraĵojn. "Bovo": emblemo de eltenemo kaj bonvolo. Alia formo: "Ruistboeuf" (ruist: impetega). En ambaŭ okazoj la kromnomo entenas en si mem kontraŭdiraĵojn kaj resumas la kontraŭdirojn, per kiuj la poeto sin ŝarĝas, kaj en sia vivo, kaj en sia verkaro. Li travivas angorigan pridemandadon pri la malbeno lin trafanta: ĉu pro la sorto? Ĉu li edziĝis sub malfavora stelo? Ĉu Dio lin obstine punadas? Li konscias, ke sperti mizeron estas necesa kondiĉo por poezia verkado; ankaŭ por malkovro de la religiaj valoroj.

El kio konsistas la tiama mondo de artistoj? Ĵonglisto estas bestomontristo, iluziisto, ankaŭ - tiu ŝanĝiĝo observeblas dum la XIII-a jarcento - homo, kiu ĉefe okupiĝas pri muziko. Dum la XII-a jarcento, trovatoroj (norde) kaj trobadoroj (sude) iras de kastelo al kastelo; poste ili estos vokataj minstrelaj (el la latina: "ministerium": servistoj de princoj, kiuj ilin akompanas, amuzas la korteganojn, instruas la mastron pri muziko, beletrio kaj rafiniteco, do pli ol nuraj "ĵonglistoj").

Ĵonglisto do estas multifaceta homo: prestidigitisto, amuzisto, vjelludisto, kapabla verki kaj deklami diversspecajn poemojn (eposon, religiajn tekstojn, fabelojn...). Ĝis la XIV-a kaj XV-a jarcentoj poezion oni ĉiam prezentas sub muziko, tiel, ke nur duarangaj estas la paroloj. Apud la religiaj verkoj ni menciuj la paroliturgiajn spektaklojn sub profana muziko. Sed ambaŭ muzikoj kaj ĝenroj profunde interpenetriĝas. Stranga fenomeno estas la parodia liturgio, okaze de tradiciaj festoj disvolviĝanta. Tiukaze la institucioj, respektindaj kaj respektataj la ceteron de la jaro, primokas sin mem (karnavalo, festo de l'azeno, festo de la frenezuloj). Ĉio estas inversigita. Sed laŭlonge de la jardekoj priplorindas troigoj pro senbrideco. Tial, dum la XV-a jarcento, oni forpelos el la preĝejo ĉiujn ĉi tiujn festojn, kiuj origine disvolviĝis ene de ĝi, dum ties roluloj estis pastroj aliigitaj al frenezuloj. Tiu parodia socio aperas maskita, kvazaŭ por vuali la homan malluman flankon. Tiun malluman

Ruteboeuf enscenigas laŭlonge de sia verkaro. Li estas poeto nekapabla ridi, ĉar la vido de la mondo kaj propra vivo instigas lin al plorado. Sed li sentas, ke unu el la poetaĵoj estas naski ridon. Li estas ĵonglisto, do la homo de artifikoj kaj sorĉotrukoj. Oni lin ne fidu, ĉar en okazo de maljustaĵo kontraŭ lin, li ja estos venĝema. Krome li strebas tiri sur sin kompatan atenton dank'al siaj ĵonglaĵoj kaj lertaj paroloj. Li transirigas de rido al ploro, de pezaj ŝercoj al plendoj. Ĵonglisto elmontras ankaŭ superajn pensokapablon, kulturon, subtilecon, emon al lukso, malavaremon kaj avidas je respekteleco. Foje li disponigas sian talenton, kiel helpilon: li diskonigas kaj pridiskutas la diversajn tiamajn vidpunktojn rilate al krucmilitoj aŭ almozordenoj; li kapablas vulgarigi alt-nivelajn debatojn inter teologiuloj kaj ekleziuloj.

La XIII-a jarcento estas tiu de la almozordenoj (sub Ludoviko la IX-a oni kalkulas ĉirkaŭ 30 000 franciskanojn kaj 10 000 dominikanojn). Tiuj ordenoj alportas novan sentivecon, novan manieron travivi la religiajn spertojn. Ilia influo eniras ĉiujn socitavolojn; el tio fontas la timo kaj malŝato de la universitatoj al ili. La moroj de tiuj monaĥoj estas multe pli puraj, ol tiuj de multaj ekleziuloj (en la fabeletoj la pastro estas prezentata, kiel diboĉulo kaj parodisiganto). En siaj versoj Ruteboeuf montras Parizon iom post iom ĉirkaŭata de monaĥejoj.

La dramo de Ruteboeuf konsistas el tio, ke li ne kapablas manlabori. Dum la Mezepoko oni opiniis, ke ĉiu devas sin vivteni dank'al la propra laboro, ĉu mana, ĉu mensa. Kiel ĵonglisto, li sin vivtenas dank'al la mono de la protektantoj, samkiel la monaĥoj sin vivtenas dank'al la mondonacoj. Ili kvazaŭ konkurencas unu la alian. Tiuj Di-servistoj elpumpas la monrimedojn de la potenculoj kaj postulas pli da mororigoreco, malpli da festoj profite al sukceso de la krucmilito. La reĝo nun manĝas ne plu ĉe malfermitaj pordoj, sed ĉe fermitaj pordoj; do la ĵonglistoj ne plu estas akceptataj.

Alia karakteriza trajto: en ĉiuj poemoj malĉeestas la bildo de virino, kiu partoprenas en la homa malbeno. Nenie volupt-

emo estas prialduta. Ĉu pro la malsukceso de la geedza vivo kaj pligravigo de la mizero fare de tiu malbonsanculino? Sed tia fundamenta misogineco tute malaperas, kiam temas pri la Virgolino. Ŝi estas ne nur Di-patrino, sed virino ne niamonda, iaspeca eterna saĝo, nia tutlasta helpilo kaj peranto. Sub influo de sankta Bernardo la mezepokuloj amoplene kultas al Maria, samtempe patrino kaj reĝino, kiu advokatas favore al la kulpuloj kaj sukcesas ilin savi eĉ en senesperaj okazoj.

"Pro la mizero, kiu min subpremas, multe ŝanĝiĝis mia versofarado". Sed kio estas tiu konstante aludata mizero? Tutunue la malproksimeco de la alia, ĉefe de la protektantoj; poste malsaneco kaj sufero. Kaj tiom da mizero pelas lin fari al si demandojn pri la religio: "la kredon oni rifuzas al mi" (kuŝas ĉi tie vortludo pri kredo kaj kredito). Pro la malriĉeco li ne sukcesas kredi la ĉefajn veraĵojn de la religio. Kial tiu malmolkoreco de Dio al li? Pli kaj pli superas la negativa flanko kaj la poezio kulminas funde de l'abismo de mizero. Li spertas grandan izolitecon, eĉ meze de homgrupo; "Meze de la riĉuloj solas mi en Parizo". Kaj por forigi el tiu mizera stato venas la terura tentiĝo: ĉar Dio foriĝas, kial ne sin turni al la alia mondoglanko, al la diablo? Tial li verkas "La Miraklo de Teofilo"—n, kiu enscenigas la deziron forvendi la animon kaj la sekvan elaĉeton. Fakte la priskribon de la elaĉeto la rakonto ĉefe celas. Ĝi lasence respegulas la vivovojojn de la poeto kun ties tentoj kaj faloj. Sed la tie prezentata diablo ne estas tro aĉa: ĝi estas tiu de la popolfabeloj, duon-juda, duon-saracena, kiun la Virgolino ne tro malfacile supervenkas. "Ho reĝino bela kaj sankta, Virgolino glora, damo gracoplena pere de kiu ĉio venas. Kiu vin vokas por helpo, tiu estas de sia peno senpezigita...Fontano ekŝprucanta, kaj ĝuinda, kaj pura..."

Trae de siaj poemoj Ruteboeuf liveras la tutan kulturon siatempan. Se notindas la erudicia flanko, nin profunde kortuŝas la tie esprimataj mizero, manko de amo tra la mondo kaj la diversaj rimedoj, per kiuj la homoj strebas sin helpi kaj forŝayi. Jen temoj kaj esprimoj, kiuj post sep jarcentoj eĥigas en nia moderna homa sentiveco.

KION VI SCIAS PRI ESPERANTO EN SVISLANDO

En la historio de la Esperanto-movado svislandanoj plurfacete rolis, kiel organizantoj, verkistoj kaj disvastigantoj de informoj pri la Internacia Lingvo. Ĉu vi povas identigi dek el ili laŭ la priskriboj de kelkaj el iliaj kontribuoj?

a. Eminentia publicisto, teologo kaj profesoro pri filozofio en Ĝenevo submetis al la Franca Akademio pri Moralaj kaj Politikaj Sciencoj en 1899 raporton pri la graveco de internacia lingvo kaj esprimis favoran opinion pri Esperanto. Lia verko "La Devo" estis tradukita en Esperanton fare de samlandano (c).

b. Ĵurnalisto kaj eldonisto kunfondis Svisan Esperanto-Societon en 1902. Li aktivis ankaŭ en Germanio, kie li kunfondis unu el la plej gravaj eldonejoj de Esperantaj libroj. Li verkis sub la pseŭdonimo D. Spero.

c. Universitata profesoro pri matematiko elpensis la internacian decimalan mon-sistemon "spesmilo" en 1907. Li estis prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo kaj la ĉefredaktoro de "Internacia Scienca Revuo".

ĉ. Luterana pastro fariĝis la unua prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo en 1902 kaj estis kunprezidanto de la 2-a Universala Kongreso organizita en Ĝenevo en 1906. Li estis pioniro de la stenografia uzo de Esperanto.

d. Ĝeneva psikologo kaj pedagogo, la direktoro de la Instituto Jean-Jacques Rousseau, aktivis en la svislanda Esperanto-movado inter la du mondmilitoj kaj estis membro de Universala Esperanto-Asocio. Lia plej-grava verko pri Esperanto estas "Enketo pri Internacia Helplingvo" (1948).

e. Juna svislandano, lerninta Esperanton en Ĝenevo en 1903, fariĝis la dua redaktoro de la revuo "Esperanto", kiun li

transprenis de la fondinto Paul Berthelot en 1907. Li signis siajn artikolojn per la inicialoj "A.R."

f. Ĝenevano, kiu lernis Esperanton kune kun "e" okupiĝis, inter aliaj aferoj, pri la apliko de Esperanto en la telegrafio, radiotelegrafio kaj radiofonio. En 1922 li helpis aranĝi interŝtatan konferencon pri lerneja instruado de Esperanto sub la aŭspicioj de la Internacia Oficejo pri Edukado, kies direktoro estis "d".

g. Juristo, kiu en 1909 aliĝis al la Universala Esperanto-Asocio fondita de "e" en 1908, okupis plurajn oficojn en tiu organizaĵo; en la periodoj 1920-1924 kaj 1928-1934 li estis la prezidanto de la Asocio. Li verkis biografion pri "e".

ĝ. Svislanda civitano, kiu naskiĝis en Germanio, oficis kiel la direktoro de Universala Esperanto-Asocio de 1924 ĝis 1946. Sub la pseŭdonimo "Georg Agricola" li verkis serion da primovadaĵaj artikoloj titolitajn "Esperantistaj Problemoj".

h. Romanĉa lingvisto ĉefredaktoris "Svisa Antologio" eldonitan en 1939 de Literatura Mondo. En la jaro 1947 li komencis prizorgi la Esperanto-elsendojn de la Svisa Kurtlanda Radio.

RESPONDOJ

a. Ernest Naville (1816-1909) estis unu el la plej eminentaj apogantoj de Esperanto en Svislando. Li estis la Honora Prezidanto de la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo (1906). Lia filozofia verko "La Devo", kvar paroladoj adresitaj al la sinjorinoj de Ĝenevo kaj Lozano, estis esperantigitaj de René de Saussure kaj aperis en 1910.

b. Jean Borel (1868-1946) estis kunfondinto ankaŭ de la Berlina Esperanto-Grupo en 1903; sekvantaj li fondis kaj redaktis "Germana Esperantisto". Lia tre populara lernolibro "Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache" aperis en dek eldonoj. La eldoneja firmao Möller und Borel estis establita en Berlino en 1903; poste ĝi fariĝis Ellersiek und Borel.

c. René de Saussure (1872-1943) okup-

iĝis pri la uzo de Esperanto en sciencoj kaj ankaŭ pri la vortfarado en Esperanto. La spesmilo, kiun li elpensis, estis uzata antaŭ la unua mondmilito en la Ĉekbanko Esperantista fondita en Londono en 1907 fare de H.F. Höveler, konata pseŭdonime kiel Ĉefeĉ. De Saussure, sub la pseŭdonimo "Antido", defendis Esperanton kontraŭ Ido, sed poste li mem proponis reformojn.

ĉ. Friedrich Schneeberger (1875-1926) stenografis paroladojn dum la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marzo (1905) kaj la rezultoj estis publikigitaj de la Oficejo de Esperanto kaj Stenografio en Laufen, Svislando. Li verkis lernolibron pri la Esperanta alfabeto de la stenografia sistemo Stolze-Schrey. Krome, li estis aktiva en la unua komitato por Bibliotraduko.

d. Pierre Bovet (1878-1965) prelegis pri la instinktoj de infanoj, enkadre de la Internacia Somera Universitato de la 17-a Universala Kongreso en Genevo en 1925. Samjare estis eldonita lia libro "Psikoanalizo kaj Edukado", kiun li verkis originale en Esperanto.

e. Hector Hodler (1887-1920) estis unu el la sekretarioj de la 2-a Universala Kongreso en Genevo (1906). Surbaze de la organizaj proponoj faritaj dum tiu kongreso, li ellaboris planon por internacia Esperanto-organizaĵo. La 28-an de aprilo 1908, li fondis la Universalan Esperanto-Asocion.

f. Edmond Privat (1889-1962) fondis radio Genève kaj en 1924, kun la helpo de la nederlanda esperantisto-inĝeniero J.R.G. Isbrücker, kunvokis la unuan konferencon por ordi la uzon de radio-ondoj. De 1946 ĝis 1962 li prizorgis la esperanto-elsendojn de la Svisa Kurtonda Radio (Radio Bern).

g. Eduard Stettler (1880-1940) verkis la statutojn de UEA en 1920 kaj 1934. De 1924 ĝis 1940 li estis Honora Prezidanto de UEA. Lia biografio pri Hector Hodler estis publikigita en 1928.

ĝ. Hans Jakob (1891-1967) naskiĝis en Heidelberg, Germanio, kaj laŭprofesie estis komercisto. Li aliĝis al UEA en 1909 kaj plenumis diversspecajn administrain

taskojn en la Centra Oficejo. En 1938 aperis "La retoromanĉoj", lia traduko de verko de la ladina poeto Peider Lansel en la engadina dialekto. Ĝi enhavas historiajn kaj etnografiajn informojn pri la retoromanĉaj valoj de Svislando.

h. Arthur Baur verkis por "Svisa Antologio" enkondukon priskribantan la kvar svislandajn literaturojn: la alemanan (germanlingvan), velšan (romandan aŭ francolingvan), tiĉinan (itallingvan) kaj la reto-romanĉan. La esperantigon de la poezio faris Hilda Dresen, Mad Mevo, Kolomano Kalocsay kaj M. Jaccard.

Bernard GOLDEN

NI RIDU

Iu patro malpacientiĝas pro la daŭra malsukceso de sia filo en la lernejo. "Aŭskultu! Ĉiufoje kiam vi ricevos bonan noton mi donos al vi 100 frankojn" - "Konsentite, patro". La postan tagon, la knabo flustras en la orelon de la instruisto: "Diru, ĉu plaĉus al vi gajni 50 frankojn ĉiusemajne?".

Dum invitofesto ĉe riĉuloj, iu invitito diras al najbaro: "Kiu estas tiu malbela, skeleteca junulino?" - "Filino de barono Rothschild" - "Ĉu? Kiel svelta kaj fajna ŝi estas!".

Kiam mi estis infano, hejme la plej malfacile eltenebla periodo estis la fino de la monato...ĉefe la lastajn tridek tagojn.

Dio diris: "Ni devas praktiki partigon. Pro tio la riĉuloj havas nutraĵon kaj la malriĉuloj apetiton.

Gajni milionojn da frankoj ĉiujare estas pli facile ol elspezi ilin saĝe.

(Tiu lastaj tri ne vere ridigaj ŝercoj estis rakontitaj de Koluŝ.)

IOM da MEDICINO

kun HIPOKRATO

Post ekzistado dumil kvincent jara la Hipokrata "ĵuro" daŭre regas medicinon en granda parto de la mondo. Nun ni scias, ke tiu ĵuro ne estis verkita de Hipokrato; eble, la granda medicinisto verkis la varianton, kiu trairis la jarcentojn kaj nedubeble spegulas lian pens-manieron. La originala teksto estis verŝajne redaktita dum la 8-a jarcento a.K. Fakte temas pri la inicia ĵuro de la Frataro de la pastroj-medicinistoj de Eskulapo, kiun la novaj inicitoj diris, kiam oni akceptis ilin en la Frataron je ilia dektria jaro.

El ĉiuj verkitaj primedicinaj tekstoj, tiu ĵuro estas la plej universala. Ĝi donas al la medicina arto iom da soleneco kaj sankteco en la servo al la homo. Ĝi identigas kun la medicino tia, kia ni konceptas ĝin:

" Mi ĵuras per Apolono medicinisto, per Eskulapo, Higio kaj Panaceo, per ĉiuj dioj kaj diinoj, kaj atestigas ilin, ke, laŭ ĉiuj miaj fortoj kaj scioj, mi respektos la jenajn ĵuron kaj skribitan promeson.

Mian primedicinan majstron mi metos sur la saman rangon, kiel miajn gepatrojn. Mi partigos mian havaĵon kun li, kaj se necesas mi prizorgos liajn bezonojn.. Mi rigardos liajn infanojn, kiel miajn gefratojn, kaj se ili deziras lerni medicinon mi estos ilia instruisto sen salajro kaj sen devontigo.

Mi transdonos la regulojn, la klarigojn kaj aliajn erojn de instruado al miaj infanoj, al la infanoj de mia majstro, al la registritaj lernantoj, kiuj ĵuris laŭ la medicina leĝo, sed al neniu alia.

Laŭ miaj tutaj fortoj kaj scioj, mi konsilos al la malsanuloj la viv-manieron kapablan helpi ilin kaj mi forigos de ili ĉion al ili kontraŭan aŭ nocan. Neniam mi donos venenon, eĉ se petita tion fari kaj ne konsilos uzi ĝin. Mi ne donos abortigon al la virinoj.

Mi pasigos mian vivon kaj praktikos mian arton en pureco kaj leĝo-respekto. En ĉiun domon, kien oni vokos min, mi eniros nur por bonfari al la malsanuloj. Mi mal-permesos al mi vole kaŭzi malutilon aŭ

koruptadon, ankaŭ fari voluptan agon kontraŭ virinoj aŭ viroj, liberaj aŭ sklavaj. Ĉion de mi viditan aŭ aŭditan okaze de la praktikado de mia arto aŭ ekster tiu praktikado kaj kiu estus malsekretigota, mi prisilentos kaj rigardos sekreto.

Se mi respektos mian ĵuron kaj neniam malobservos ĝin, espereble rajtos mi traĝui mian vivon kaj mian profesion kaj ricevi ĉiaman honoron de la homoj. Sed se mi malobservos ĝin kaj fariĝos ĵurrompanto trafu min kontraŭa sorto.⁷¹

Analizante la tekston oni konstatas, ke temas pri esotera dokumento, sankta, rezervita por inicitoj. Ĝi entenas tri partojn: alpeĝon: la medicinisto petas la diojn atesti la promeson; prezentadon: elnomadon de la devoj respektotaj de la medicinisto en sia servado; minaco de malfeliĉo al la malobeanto. La dua parto (prezentado) mem entenas tri partojn: devojn de la estonta medicinisto kontraŭ sia majstro kaj malpermeso malkaŝi medicinon al nealiĝintaj lernantoj; teknikajn devojn aŭ malpermesojn; moralajn devontigojn, el kiuj estas la "medicina sekreto".

La teksto estas do perfekte konstruita kaj la morala forto eliganta estis profunde sentita tra la jarcentoj. Ĉiu medicina skolo akceptis tiun tekston adaptante ĝin al la tiamaj moroj. La ĵuro nuntempe dirita de la junaj francaj medicinistoj estas preskaŭ la kompleta traduko de la Hipokrata teksto, farita de Prof. Lallemand, dokano de la fakultato de Montpellier en 1794, kiu, pro la epoko, anstataŭis la formulon "per Apolono la medicinisto" per "per la Plej Alta".

La plej konata verkaĵo de Hipokrato estas la libro de "Aforismoj". Ĝi konsistas el kvarcent dekdu reguloj, ĝenerale mallongaj, kiuj resumas la ĉefajn principojn instruitajn de Hipokrato. Ĉiu aforismo estis la temo de unu leciono. Jen parto de tiu fama verkaĵo, pri la rilatoj inter la aĝo kaj la malsanoj:

"Infanoj kaj novnaskitoj suferas de aftoj, vomadoj, tusado, maldormo, terur-krizoj, inflamo de la umbiliko, oreĉ-elfluoj. Kiam alproksimiĝas dentokreskado iliaj gingivoj estas agacitaj kaj aperas febroj, konvulsioj kaj laksoj; tiuj akcidentoj

okazas, kiam ekkreskas la kojnodentoj, ĉe la dikaj infanoj kaj ĉe tiuj, kies intestoj estas streĉitaj.

Pli aĝaj la infanoj povas esti trafitaj de tonsil-inflamo, elartikigo de la nuk-vertebroj, astmo, liliazo, rondaj vermoj kaj askaridoj, pediklaj verukoj, mumpso, skrofolo, ankaŭ aliaj specoj de ŝvelaĵoj.

Kiam alproksimiĝas seksmatureco aldoniĝos longdaŭraj febroj kaj sang-ellaso. Ĝenerale la malsanoj de la infanoj finiĝas post kvardek tagoj, aŭ sep monatoj, aŭ sep jaroj, aŭ kiam alproksimiĝas seksmatureco. Se ili transpasas la limon de seksmatureco ili plej ofte daŭras la tutan vivon.

Ĉe la adoleskoj aperas sang-kraĉado, ftizio, akutaj febroj, epilepsio kaj aliaj specoj de malsanoj. Post tiu aĝo la homoj estas trafitaj de astmo, pleŭrito, pneŭnomio, letargiaj febroj, longdaŭraj diareoj, ĥolero, disenterio kaj hemoroidoj.

Fine la maljunuloj povas esti trafitaj de dispneo, kataro kun tusado, misurinado, disurio, artikaj doloroj, apopleksio, kakeksio, jukoj, maldormo, ellaso de la intestoj, de la okuloj, de la nazo, vid- kaj aŭd- malfortiĝo, katarakto.

Jen aliaj aforismoj el la verkaĵo de Hipokrato:

"En okazo de akuta malsano ne eblas prognozi certece morton aŭ resaniĝon.

Kiuj facile fekas dum sia junaĝo, tiuj konstipiĝas dum sia maljunaĝo. Sed kiuj konstipiĝas dum sia junaĝo, tiuj havas ventron liberan dum sia maljunaĝo.

Vino interrompas apetiton.

Malsanoj kaŭzitaj de troabundeco malaperas per elĵeto; tiuj kaŭzitaj de manko malaperas per supernutrado.

La kvartanaj febroj ĝenerale daŭras malpli longe dum somero, sed pli longe dum aŭtuno, ĉefe kiam vintro alproksimiĝas.

En malsanoj akute komenciĝantaj la prognozo estas pli bona se la simptomoj antaŭvenas la febron; malpli bona se febro aperas unua.

En ĉiuj malsanoj estas bone, kiam la umbilika ĉirkaŭaĵo kaj la subventro konservas dikecon. Kiam ili maldikiĝas kaj kakeksiĝas, la aŭguro estas malfavora, kaj laksigo fariĝas dubeŝanca."

El diversaj dokumentoj

ἅΠΑΝΤΑ Τὰ ΤΟΥ ἹΠΠΟΚΡΑΤΟΥΣ

OMNIA OPERA HIPPOCRATIS



Ne quis alius impone, aut Venetiis, aut usquam lo-
corum hos Hippocratis libros imprimat, &
Clementis VII. Pont. Max. & Sena-
tus Veneti decreto cau-
tum est.

BOHEMA TAGO

L.N. NEWELL

La studento malrapide malfermis unu okulon kaj metis la pinton de la nazo ekster la litkovrilojn; kaj tuj ĝin retiris. Frostas ankoraŭ ĉi matene; li kuŝis kelkajn momentojn rigardante sian spirvaporon leviĝantan al la plafono, ĝuante la varmon de la lito. Tre kontente li pensis pri nenio. Nenio...nenio...kiom bela estas nenio...nenio estas nenio; vere. Subite li saltsidiĝis sur la lito: diablo! kioma horo estas? Li time rigardis la horloĝon. Ĝi estis bela horloĝo, donaco de parencoj en lia hejmlando malproksima kaj aspektis, se oni ne tro atente rigardis, kvazaŭ el oro. Ĝi fruis po dek minutoj ĉiutage: utila trajto ĉe horloĝo de tiu, kiu devas leviĝi frue. Bedaŭrinde, li neniam aŭdis ĝian sonoron matene kaj dormis ĉiam preter de leviĝo-horo; ĝia speciala merito do ne multe utilis.

Ĝi montris naŭan kaj duonon. Infero kaj diablinoj! Li malfruos denove ĉe la unua preleĝo en la Sorbono. Li faris konvulsian movon, kvazaŭ por salti el la lito: tiam paŭzis. Tamen, tamen, ĉu ne estas libertempo hodiaŭ? Malrapide la bela penso grandigis lian koron, tiel ke li forgesis eĉ la malvarman aeron ĉirkaŭ siaj ŝultroj. Jes, vere, marŝalo de Francujo mortis kaj hodiaŭ oni enterigas lin. Benata estu tiu marŝalo! Oni dekretis libertempon unutage. Oni ne bezonas esti pacifisto por deziri la morton de ĉiu marŝalo kaj generalo en la mondo!

La studento rapide refalis kaj kuŝis sur la maldekstra flanko. Nu, necesas leviĝi, tamen; oni ne povas dormi, kiel porko tutan tagon. Li konsultis sian stomakon; tio ankaŭ konsilis la paŝon necesan por matenmanĝo. Li turnis sin kaj kuŝis sur la dekstra flanko, kaj fikse rigardis la malhelajn murojn de la ĉambro, la polvokovritan plankon: bedaŭrinde, ke la dommastrino estas tiom mallaborema; sed kiam oni pagas nur cent kvindek frankojn monate, oni ja ne kuraĝas plendi. Li rigardas la mornan fornon, kiu nenion entenis de kiam li ekluis la ĉambron; kaj per natura flugo de l'penso, li rigardis tra la altaj fenestroj la grizan, neĝogravedan ĉielon. Ankoraŭ pli malvarme!

Li serĉis kialon por ne leviĝi...sed ne trovis. Do, jen, jam li sidas sur la rando de la lito, penseme okulumante siajn pantoflojn pacience atendantaj. Hezito ne utilis; li saltis al la nuda planko kaj rapidege surmetis la pantoflojn kaj staris momente, aŭskultante: nenio sono, krom la majesta tiktakado de la horloĝo; do la dommastrino jam foriris al sia ĉiutaga laboro. Li povus kredi, ke tuta Parizo mortis, aŭ perdiĝis sub dika neĝtavolo. Kun tiro de la ŝultroj li iris en la malgrandan kaj malpuran kuirejon kaj plenigis kaseroleton per akvo. Tiam fivortis: li denove lasis la alumetojn en la litĉambro. Tremante kaj sin ĉirkaŭbrakante, li susure paŝis al la apudlita tableto, kiu portis la kandelon kaj libron, kiuj provizis la lastan regalon antaŭ dormo nokte, prenis la alumetojn, kaj reiris al la gasforno en la kuirejo. Bruliginte, li komencis akrigi sian razilon; li troigis siajn movojn por varmigi sin samtempe. Liaj pensoj vagis al la hejmo trans kvar landlimoj; kiom varme estis tie! Kiom bone malsupreniri la ŝtuparon en la manĝoĉambron, kaj manĝi ĝis sato kun konataj, amataj vizaĝoj! Ah! eble estas letero. Li rigardis ĉe la ekstera pordo de l'appartemento; ne, ne estas hodiaŭ. Kiam li trovos oficon, post fino de l'studoj, li plenegigos tiun fornaĉon, ĝis ĝi ne povos spiri; diablo! Oni bezonos tutan ĵaron por revarmiĝi!

Bolas la akvo; bone. Li plenigis tason kaj portis al la granda spegulo de sia vestoŝranko. Trempinte la penikon, li komencis ŝmiri la vizaĝon kun volupta sento ĝuante la varmon de l'akvo. Nun li iomete malpli tremas; bone, ĉar oni facile tranĉas al si la oreilon sin razante, kiam oni tremas pro glacia aero. Li rigardis sian vizaĝon tre serioze en la spegulo. Kurioza tipo: fine, estas io simpatia, en kelkaj pozoj. Li komencis sapumi, kaj altigis la nazon. Nu, jen, tiel li havis mienon iom impresan; jes, sed ne estas bone alpreni tian sintenon, kiam oni estas malriĉega kaj samtempe ne scias obeigi eĉ kelneron..Eble tiel, jes tiel, kun la kapo klinita malfermitaj, la okuloj larĝe, melankolie malfermitaj, jes, tiel li aspektas...nu, interese. Subite li ekkonsciis pri siaj agoj, moke kurbigis la lipojn al sia reflektito, tremrapide alprenis la razilon kaj entuziasme skrapis.

Denove la ĉiutaga problemo: ĉu laŭi sin per varma akvo aŭ malvarma? Li estis stariginta por si spartanan regularon, por

sin hardi; kaj inter ili troviĝis la tre firma regulo, lavi sin ĉiam per malvarma akvo, eĉ dum la plej malvarma vetero. Sed...sed ja kostas neniom, kaj li hodiaŭ ne povos pasigi la matenon en varma aŭlo de la universitato. Li reveme portis kuveton, sapon, dentobrosan kaj dentpudron, kaj mizere maldikan viŝtolon, al la ŝtona trogo de la kuirejo; tamen ne estas bone cedi sin al la luksemo, almenaŭ ne ĝis kiam oni havos sufiĉe da mono por kontentigi sian deziron. Ankoraŭ profunde pripensante la problemon, li meĥanike, nekonscie, plenigis kaserolon per akvo kaj bruligis la gasfornon. Vidinte sian agon li ridetis, rezigne... Li ĝoje trempis la manojn en la varman akvon, kaj komencis lavi sin. Kion diris la angla poeto pri "la beno de l'varmega akvo"? Preskaŭ varma, krom ĉe la piedoj, li sekigis sin, kombis la harojn, kaj zorge prenis la pantalonon de inter la matracoj. Necesis akrobataj pozoj por demeti la piĝamon kaj surmeti la pantalonon tiel, ke la ekstremoj ne tuŝu la polvon sur la planko; sed li sukcesis. Li kritike rigardis sian kolumnon: eble oni povos porti ĝin ankoraŭ pluan tagon? Ne estas tre malfacila, kaj cetero, li ne devos montri sin hodiaŭ al la profesoroj. Lastan semajnon la tollavo kostis pli ol dek frankoj; tiun ĉi semajnon, necesas ŝpari.

Vestinte sin, li admiris en la spegulo la faldon de la pantalone; kaj sin turnis al la plej grava ero de la matena ceremonio: la matenmanĝo. Li portis la lakton aĉetitan hieraŭ vespere al la kuirejo, kaj denove bruligis la gason sub la kaserolo. Dum la lakto varmiĝis li pecigis la panbuleton kaj metis en tasegon; kaj poste surverŝis la bolintan lakton. Sidiginte ĉe la tablo kaj apoginte l'ernolibron pri la romana juro kontraŭ la kruĉo, li komencis manĝi. Li manĝis malrapide, plengustumante ĉiun buŝplenon aprezeme; ja ne estos plua manĝo ĝis la vespero. Fininte la manĝon, li provis ankoraŭ studi, sed ne povis atenti la legaĵon: li tro tremis de la malvarmo.

Kun suspiro li leviĝis, surmetis la ĉapelon kaj palton, kaj eliris, zorge ŝlosante la eksteran pordon. Nun malsupren, unu, du, tri, kvar, kvin, ses etaĝojn. Ĉe ĉiu etaĝo la peza bruo de la urbo plilaŭtiĝis kaj li aŭdis la akran trumpetadon de la taksioj. Li kriis: "Bonan tagon", al la pordistino, kaj jam staris sur la strato. Parizo havis sian kutiman matenan aspekton. Fluis kantete pura akvo ĉe l'randoj de la vojo, tiel ke la subaj ŝtonoj prenis siajn naturajn helajn

kolorojn, kaj faris frapan kontraston kun la kota trotuaro. Estis nigra vento, kiu silente kaj rapide ŝtelis la varmon; la ĉielo subpremis la teron. La domoj ŝajnis kunpremi sin por trovi iom da ŝirmo kontraŭ la vento.

Kien? Unue al la Panteono. Li elektis punkton sur la granda placo de kiu li povis vidi samtempe la Panteonon, la preĝejon St Etienne du Mont kaj la longan flankon de la biblioteko St Genevieve. Tre baroka, tiu St. Etienne du Mont, tre jezuita, iom tro emfaza, sed gaja, fiera, kurbe bela, eĉ sub la ombranta maso severa de l'Panteono. Kaj la renesanca gracio de la biblioteko memorigis lin pri la suno de Italujo. Jes, li pravus, venante al Parizo; esti ĉirkaŭita de tiaj belaĵoj valoras la malvarmon, la nesufiĉan manĝadon, eĉ la solon. Li staris por aprezi la scenon, sed la vento pordis lin, kaj li formoviĝis, profundigante la manojn en la poŝojn. Li paŝis en tiun perditan vilaĝon, kies centro estas la placo, kie renkontiĝas la strato Descartes kaj la strato de la Montagne Ste Genevieve: vilaĝo antikva, vivoplena, malriĉega. Li rigardis la dommastrinojn susurirantajn en pantofloj al butikoj, kun pensoj koncentritaj je ŝparo.

Kioma horo? La dek-unua kaj dek-kvin. Ankoraŭ kvardek-kvin minutojn ĝis kiam li povos permesi al si tason da kafo. Li komencis marŝi malrapide, sed denove haltis. Ja kien? Nu al Sejno, ni vidu ĉu ankoraŭ estas inundo. Pasante la kafejojn li forturnis la kapon, por ke la tento eniri ne estu tro forta. O plumbopieda tempo, kial oni diris, ke vi flugas? Vi eĉ ne rampas... Ah, jen Sejno, kaj Notre-Dame revanta pri siaj jarcentoj kaj pri sia ne plu komprenata belo. Tiu kirliĝanta, grize-verda akvo...kiom kruela, malvarma! Kiel la homoj povas ĝin preterpasi, eĉ ne rigardante kun tremeto? Li forturnis la okulojn, kaj komencis trafoliumi la librojn de la librovendistoj de la kajo, sed sen granda intereso, sciante, ke li ne povos aĉeti. Se oni amas librojn estas malfacile rigardi ilin kun poŝoj malplenaj. Ĉu eterno komenciĝis? Estas ankoraŭ nur dudek antaŭ la dekdua. Ankoraŭ dudek minutoj: dudek eonoj, dudek abismoj en la tempo, ĝis kiam li povos eniri lokon, kie estas homa varmo. Li tiris ĉirkaŭ si pli strikte la palton kaj klake paŝis sur la ponton. Se li marŝos al Parvis Notre-Dame, al Châtelet, trans la riveron denove, tiam laŭ strato Monsieur le Prince en la ĝardenon de Luksembourg kaj de tie laŭ

bulvardo St. Michel, li alvenos al la kafejo de la Sorbonne proksimume je tagmezo. Eble li tie renkontos konaton de l'universitato; estus, bone babili super bonodora kafo. En la kafejo estis la kutima aro da studentoj: junaj, fanfaronemaj, krientaj aforismojn por solvi ĉiujn problemojn de l'universo. Estis tie neniu de li konata, sed rekompence estis varme, viglige. Li mallevis sin sur remburitan benkon kun suspiro kaj mendis la sopiratan lakto-kafon. Li metis alumetojn kaj cigaredojn sur la tablon, kaj atendis: la sibirito estas metodema pri siaj plezuroj, kaj la studento neniam bruligis sian cigaredon ĝis post la unua gustumo de l'kafo. La kelnero tinte starigis la glaseton, kun miriga lerto ĵetverŝis unue kafon, poste lakton. La studento kirlis zorge, pie gustumis, kaj atentis la revenan guston sur la palato. Li ja estis sibirito. Nun la cigaredo. Li prenis unu el la cigaredujo; ekzamenis; kaj metinte inter la lipojn, almetis brulantan alumeton. Li ensuĉis ravite la fumon kaj tenis en la pulmoj kun duonfermitaj okuloj; elspiregis kaj rigardis la leviĝantan nubon. Ah, jen ĵurnalo, okazo por ekzerco pri la franca lingvo; li legis atente.

Je la dua kaj duono li eksentis sin nekomforta; ne plu estis eble sidi senzorge, profundiginta en la legaĵo. Li levis la rigardon kaj renkontis la akuzajn okulojn de la kelnero, kiu ne aprobis homojn, kiuj sidas preskaŭ tri horojn super unu glaso. La studento rapideme trinkis la lastan malvarman guton de la kafo, metis frankon kaj duonon apud la teleron, surmetis la ĉapelon kaj eliris sur la bruan bulvardon. Li sentis sin varma, pli esperema; sed la penso pri la kvin horoj inter nun kaj la vespermanĝo ombris lian menson.

Per marŝado rapida kaj malrapida, per rigardado en butikofenestrojn, per observado de la tipoj sur la stratoj, per meditado pri la belsonaj kaj memorplenaj nomoj de la stratoj Parizaj, per kvaronhoroj pri kiuj li poste memoris nenion, li sukcesis pasigi la tempon ĝis la sesa kaj duono. Kaj tiam li permesis al si la lukson demandi sin, en kiu lando li vespermanĝos. Eble en la rumana aŭ la hungara restoracio; la pladoj estas grasaj kaj varmigaj. Eble en la ĥina...ne, oni bonege manĝas, sed por unu persono la kosto estas iom alta. Eble en la rusa ĉe la supro de la strato St. Jacques; tie oni povas

aŭskulti belajn rusajn kantojn ludatajn per gramofono, kaj la borŝto estas rava. La pola, proksime de Luksembourg estas ankaŭ multekosta; tiu ne taŭgas. Ĉu la bulgara en la strato Monsieur le Prince? Aŭ la rusa vegetarana en la strato de la Montagne Ste Genevieve? tiu estas malkara, pura-kaj kvjeta; sed ne, hodiaŭ li nepre deziras iom da viando. Ĉu la itala? Tamen, ĉu tiu vegetara, kiu kostas nur kvar frankojn, kaj kie ne estas kelneroj?

Li marŝadis, pensante pri la elekto; surprizite li rimarkis, ke estas la sepa dek, kaj ankoraŭ li ne estas elektinta. Nu, necesas decidi; kiun iri? kiun iri? Nu, la rusa; li ekpaŝis. Tamen tiu estas je fiksita prezo kaj en tiaj restoracioj oni preferas rapidajn gastejojn. Do, estu la rumana; estas tie varmiga manĝo.

Horon kaj duonon poste, li trankvile paŝis denove en la kafejon Sorbonne, kun la mieno kaj kontenta menso de bone nutrita grafo. Li mendis kafon, ekfumis la trian cigaredon de la tago, kaj eliris el la poŝto la Eneidon, kiu nun, post tuttaga portado, taŭgis al lia humoro. Li profundigis en la ondanta tondro, la fatala marŝo de la latina:

Tamen ĉielo turniĝas kaj el Oceano leviĝas Nokto, per ombro densega vindante poluson kaj teron,

Kaj artifikojn Mirmidaj: tra urbo Trojanaj vagadas,

Poste silentas; kaj membrojn lacetajn penetras dormado,

Kaj militaro Arguja samvice sur ŝipoj elvenis

Jam al Tenedo, vidata sub luno amike silenta;

Bordon ĝi iris konatan. Dum fiamon levigas ĉefŝipo

Reĝa, Sinono, de diaj fataloj savita maljustaj,

Trabojn malfermas abiajn, Danaojn en ventro kaptitajn

Liberigante. Tuj ilin al lumo redonas ĉevalo monstra...

(daŭrigota)



LA LIBERIGO DE LA JUĜISTO

F. Szilágyi

"Sed kara, ne faru skandalon por tiu bagatelo..."

"Nu jes, mia laboro, miaj zorgoj, kiel dividi vian salajraĉon, mia ŝvito, miaj mortlacaj manoj al vi estas nur bagatelo. Sinjora Moŝto nun iros en la oficejon kaj juĝos de la alta piedestalo kaj ne pri-zorgos la ĉifonojn kaj la bagatelojn de la stulta edzino... Jen manĝaĵo al vi. Certe vi denove malfrue revenos."

La juna iom diketa virino laŭte, iom plezure bruis, kverelis kun sia edzo, kiu komence serene kaj poste pli kaj pli ĉagrene rigardis ŝin. Nun realvenis la servistino, pro kiu okazis la disputo kaj la tuta afero ŝajnis al li tre teda kaj ĉagrena. Vere li ne ĉagreniĝis pro la disputo; tiaj aferoj estis ja ne tre danĝeraj kaj rapide ili forkuris; sed la vizaĝo de la edzino subite respegulis la venontan dikecon kaj laŭtecon de la iom post iom maljuniĝanta virino kaj subite li sentis fremdiĝon, kian li sentis dum siaj knabjaroj kontraŭ onkklinoj, kiuj estis ĉirkaŭ la kvindeka jaro kaj kiuj estis laŭtaj kaj...eh, li ne devas timi siajn pensojn... estis ne tro apetitigaj. Kaj li alrigardis la antaŭ ne tre longe aĉetitajn meblojn kaj la matenan mal-ordon; kaj subite li ekvidis en ili la bone kaŝitan antikviĝon, ordinariĝon, griziĝon kaj kadukiĝon de la tuta vivo, kiun li hodiaŭ, ĝuste hodiaŭ, ne volis vidi. Hodiaŭ ja estas tiel bela tago, li vekiĝis tiel serene, senzorge, tiel rideme, kiel la oktobra ĉielo, kiu por momento, same kiel li, resoriĉis al si la brilon de la printempo. Li ja ne estas maljuna, tridek-kvinjara viro, rapidkariera juĝisto kaj li havas la pozon de la trankvila, konscia, senpera kaj afabla viro, kies puritaneco kaj seriozecon la onidiro ĉie akcentas. Kaj tiu terura disputo! Jes, oni ne povas diri, ke li vivas senzorge, sed liaj zorgoj ne estas tiel minacaj. Oni devas iomete dividi, iom ŝpari, sed...sed hodiaŭ ĉio estas tiel ridema, tiel afabla, ne...ŝi ne rajtas forfaĵi per sia grumblando la sere-non de la sunriĉa oktobra tago. For, nur rapide for.

"Ĉu la sinjora Moŝto ne bonvolus sciigi al mi la tempon de sia majesta alveno? grumblis moke kaj iom pli mallaŭte la virino, kiu volis vidi nur tiun bagatelon, kiu lin absolute ne interesis, hodiaŭ, sed kiu pli forte varmigis ŝin, ol la mirinda reviviĝo de la aŭtuna naturo.

"Mi devas prirakti hodiaŭ multe da aferoj," rekriis la juĝisto kaj li jam estis ekstere. "Vere nevole mi mensogis," li pensis, Dum la tuta antaŭtagmezo li estis havonta nur unu aferon. Sed ankaŭ tio estas tro teda hodiaŭ. Li ja ofte sentis kontraŭdirojn en sia profesio; hodiaŭ li ne havas eĉon denove batali kontraŭ si.

Preskaŭ dance, iom fajfete li troitis tra la flankstrato. Li preterkuris la domzorg-anton, kies farizean humilon li reciprokis per bonhumora afableco. Tiu rigardis post li kaj pensis: "Kiu povus trovi la kaŭzon de lia bonhumoro. Antaŭ du minutoj li kriadis en la kuirejo - "Estas frue ankoraŭ," konstatis la juĝisto kaj ekiris al la kontraŭa direkto. Sur la stratoj koketaj servistinoj ekbrilis, ridetis kaj kurantaj junuloj, labor-istinoj, junulinoj reridis al la sunradioj; la benzin-vaporo, la polvo brilis kaj bonhumore dancigis la petolajn bakteriojn en la flava aŭtuna aŭreolo de la metropolo. Sur la angulo de la dua ŝtrato ŝlimvizaĝa etulo ludis en la sablo, kiun, lia patro, la posed-anto de la karbokelo, en granda kesto metis sur la trotuaron, por ke la malforta infano havu aeron; sablon kaj enspiru la fortigan varmon de la sunbeno. Li knedis la delikatan, oran sablon, la trijara etulo, knedis, aspergis, konstruis el la sablo, kiam venis bonhumora giganto. La bonhumora giganto kaŭris apud la knabeto. Li ekenviis la infanon kaj, sub la preteksto de la amikemo al la infano, ekkaresis la mal-puran vizaĝeton kaj sub la sama preteksto, sub la devigo de la diabla petolemo, li komencis filtradi la delikatan sablon. "Kiel bela, ora sablo", li diris miele al la infano. Sed la terura infano estis avara, li ŝajne rekonis la egoistajn motivojn en la agado de la juĝisto kaj ploraĉe li kuris en la kelon al la patrino kaj senigis la juĝiston de lia preteksto sub kies flugiloj inside li povis ludi. Ludi. Kion fari? Li pluiris. Post kelke da minutoj li sentis nerezisteblan deziron singarde paŝi, paŝadi, ke nur ĉiun duan ŝtonkubon lia piedo tuŝu kaj tiu tasko ŝajnis al li terure grava kaj tuj poste li komencis mediti: "Ĉu mi frenezigiĝis?"

Ne, vere li ne estas freneza; tion li sciis kaj la sola kaŭzo de tiuj strangaĵoj estas la bonŝanca retrovo de la infaneco. Kaj poste

venis stratlanterno kaj li devis ĉirkaŭrigardi kaj konstati, ke neniu rigardas lin; li jam estas en -la senhoma vilao-kvartalo kaj poste li devis ĉirkaŭiri la stratlanternon kaj denove ĉirkaŭiri. Kiam la trian fojon li devis iri serioze ĉirkaŭ la lampo-kolono, virina voĉo alkriis lin el la etaĝa fenestro de la plej proksima vilao: "Ĉu vi perdis ion, sinjoro juĝisto?" - "Jes, sinjorino; ha, bonan tagon, sed mi jam retrovis mian cigaredingon", respondis purpurvizaĝe la juĝisto, kiu klinis sin por levi la retrovitan nenion. La sango fluas al lia kapo, kaj post iom da salutbalbutado preskaŭ kure li forfuĝis. "Terura urbo! Karcero! Konatoj kaj konatoj ĉie..." li grumbliis. La malfavoro de la hazardo iomete vundis lian bonhumoron, sed baldaŭ li forgesis ĉion kaj li atingis la placon de la stacidomo. Freneza penso obsedis lian volon kaj en la sekva minuto li jam telefonis al sia kolego, ke li havas neatenditan kaj neprokrasteblan aferon kaj "ĉu vi bonvolus anstataŭi?" Jes tute simpla afero, cetero la protokolisto konas bone ĉion. "Jes prokrastu" - "Dankon, koran dankon", kaj li jam staris antaŭ la biletkaso kaj jam estis en lia mano la bileto al la banloko situanta apud la grandega lago, en trihora distanco de la ĉefurbo. Tie nun, dum la aŭtuno, li renkontos nenium. Li volis "ludi", ludi, senzorge infane sub la libera ĉielo. Kun la sento de radianta infaneco li trovis lokon en malgranda kupeo.

Ĉio estis tre agrabla. La vitrohalo de la stacidomo revokis la feliĉan ekscitiĝon de la junaj jaroj; la krio de la vendistoj, kiuj en radaj turoj rulis delikataĵojn (tuj li aĉetis el ili), la vigla movo de la vivo, la energia ritmo, ĉio, ĉio anoncis la liberigon. Kaj tiu liberiĝo junrozojn sorĉis sur la vizaĝon de la juĝisto, la bluan de la ĉielo pentris sur liajn okulojn kaj la miraklon de la homa optimismo; la infanan ĝojon de blonda, altkreska kaj korekta viro mjre kaj serene rigardis iu. Verdire li estis iom tro okupita pri la forkura jubilo kaj tiel okazis, ke la ĉarma vizaĝo de la juna virino, kiu sidis kontraŭ li, nur tiam ekkaptis liajn okulojn, kiam la rapidvagonaro, kun majesta ekmovo komencis sian vojon. De kiam li ekhavis la bonŝancan ideon forlasi la urbon, ĉio favoris al li, ĉio nur plialtigis lian feliĉaĉan transformiĝon. Ankaŭ tiu ĉi bela vizaĝo! Kvazaŭ ŝi estus reveninta el la revoj de la knabaj jaroj. Gracia, maldika, subtila figuro, malhela onda hararo, kiel ĉarme ŝi ekskuis nun la delikatan etan

kapon, kiel ondumas la mallonga hararo, kiel maldikaj estas la belarkaj lipoj, kiel milda koketemo estas en la malhelaj vestaĵoj, el kiuj marmore reliefigas la belforma kolo kaj la ĉapenaŭ korektita natura koloro de la vizaĝo... Kaj la vagonaro kuregas. Kiel belege brilas la suno, kian transternan ridon ĝi sorĉas al la aŭtuna vivo, kiel bela estas la kolorkanto de la arbustoj, kiuj ruĝajn, brunajn, flavajn kaj melankolie malhelajn salutojn-komplimentas al la malfidelaj sunradioj. Kiel belaj estas la apudmontaj vilaĝoj kun la blanke ridaj domoj, kun la timemaj blankaj anseroj kaj amikaj infanoj, kiuj gaje mansignas al la giganta maŝino, por forporti iliajn salutojn al la fabellando, kiun ĝi kuras. Kiel bele! Kiel bele!... La trian fojon li jam laŭte diris: "Kiel bele!..." - "Vere tre bele", respondis simple, amike, nature la junulino, kiu jam de minutoj atentis, iom patrinece, la viron, kies vizaĝo tiel kompreneble aperigis liajn sentojn, ke vere ne estis malfacile sekvi liajn pensojn.

La juĝisto, iom surprizite, alrigardis ŝin. Ankaŭ tiu ĉi senpera aliĝo al liaj pensoj, estis ne esprimeble agrabla; li spiretis kvazaŭ en varmeta akvo; ĉio, ĉio servis nur la neverŝajne fabelan etoson, kiu ĉirkaŭis lin hodiaŭ. Tiu ĉi subtila ĉarma knabino! Lin ektuŝis la atmosfero de la unua knabamo. Jes, li devus poemi pri tiuj lipoj. Nur momenton aperis en li la riproĉ-plena vizaĝo de lia bonaplomba ĉiutaga burĝmemo, sed en la sekva minuto li jam denove transdonis sin al la admiro de la forkuranta kato, flirtanta papilio aŭ al la plena admiro de la knabino.

(daŭrigota)

KIEN MI DEVAS SENDI MIAN ABONON?



Ne plu cerbumu! Rigardu la unuan kovrilpaĝon (franca adreso), aŭ la lastan (niaj perantoj).

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

POR VIA DISTRO

Trovotaj vortoj: Japanujo - Konduktoro -
Skandinavio - Printempo - Fromaĝo -
Giganto - Peltmantelo - Ĉapelo - Salajro -
Sigismundo - Ekspreso.

Trovota frazo: Feliĉa estas la popolo, kiu
siajn grandajn virojn en la ĝusta tempo
senkapigas.

SILAB-ENIGMO

BLE - BRA - CED - DO - DO - FLA - FO - FRA - GRI - HAV - HUN - KI - KI -
KI - KO - KO - KO - KO - KO - KOF - KRE - KRI - KRO - KRU - KRU - LAK -
LIB - LIN - LO - MAR - MAR - MAR - MEL - MO - NI - NO - PAS - PET - RO -
RO - RO - RO - RO - STE - SVE - TA - TO - TO - TO - TO - TRE - TRI -
VA - VOS - ZA.

El la supraj 56 silaboj formu 28 dusilabajn kaj kvinliterajn vortojn kun la signifoj:

1. Infannutraĵo - 2. Grava malbonfaro - 3. Korpoparto - 4. Tagnomo - 5. Homa korpoparto
6. Plej bona amiko - 7. Fari maŝteksaĵon - 8. Tutmonda mono - 9. Elpremadi lakton -
10. Koloro - 11. Nomo de monato - 12. Ceremonia jako - 13. Besta korpoparto -
14. Skandinavia mono - 15. Vojaĝa portilo - 16. Vira nomo - 17. Lerneja skribilo -
18. Sovaĝa katego - 19. Tre dekliva - 20. Alta arbo malgrandazia - 21. Kriaĉi -
22. Germana mono - 23. Perdi la konscion - 24. Franca havenurbo - 25. Ludkartkoloro -
26. Fidela amiko - 27. Koloro - 28. Granda festo.

La mezaj literoj de la vortoj formas proverbon, kies pravecon ofte pruvis historiaj faktoj, kaj kiu estas averto al krimuloj kaj potenculpi.

LA VIVO EN GRESILLON

GENERALA KUNVENO - 18-an DE MAJO 1996

Je la 15.30 horo la prezidanto D. Babin anoncas, ke 223 membroj ĉeestas aŭ estas reprezentataj; la asembleo rajtas interkonsiliĝi.

La nombro da akcioj akiritaj plialtiĝis je 15 (por 1 500 frankoj) sed 13 estis transformitaj en donacojn. La nombro da membroj estas 922 kaj la kapitalo 213 600 frankoj.

En 1995 la nombro da restad-tagoj estis iom malpli granda, kvankam la nombro da ĉeestantoj estis la sama, kiel en 1994, pro tio ke la staĝanoj restadis malpli da tagoj en la Esperanto-Domo. Por ĝuste taksu la financon bilanco de la jaro koncerne la restadojn estas necese konsideri la altigon de la TVA (plus 2%). La kasistino klarigas, ke la ĉapitro "Diversaĵoj" enhavas du subĉapitrojn: "mielo" (pli facile vendita en 1995 ĉar rikoltita pli frue), kaj "produktoj". Tiu lasta temas pri neuzitaj nutraĵoj, kiuj, fine de la someraj staĝ-periodoj, estas aĉetitaj de diversaj personoj. Post kelkaj klarigoj koncerne la salajrojn kaj la kontraktojn, la kasistino klarigas, ke la ĉapitro "prizorgado" entenas prizorgadon de la konstruaĵoj, de la parko kaj de la materialo: hejtigiloj, fotokopiilo, abelujoj,...

La 1995-kontoj estas unuanime akceptitaj.

Pri la bilanco la kasistino substrekas, ke la "donacoj por la infan-renkonto" estis kolektitaj dum la dua parto de la jaro 1995 sed estis uzataj nur en 1996. Diskuto estiĝas koncerne la konton "gres-y" ĉe UEA. Tiu konto estas uzata por aĉeto de libroj sed ricevas monon el diversaj landoj ne nur por la Libro-Servo sed ankaŭ por Kulturaj Kajeroj, por pago de aliĝoj al studperiodoj en Gresillon, kaj donacoj al la Infan-Renkonto. Estas dezirinde studi tiun problemon.

Iu ĉeestanto atentigas pri la fakto, ke la amortizo superas la investojn en 1995, kio estos danĝera se tiu situacio daŭros.

La bilanco estas unuanime akceptata.

La raporto pri la aktivaĵoj insistas pri la sukceso de la Infan-Renkontoj, kiuj okazis dum du sinsekvaj semajnoj sed kun du diversaj grupoj de ĉeestantoj. La someraj stud-periodoj estis tre interesaj pro la valoro de la diversaj aktivaĵoj: kursoj, prelegoj, prezentado de diversaj instrumentadoj. Tiu raporto estas unuanime akceptita.

La rezulto de la balotado koncernanta la renovigon de duono de la komitatanoj estas tiam anoncita: validaj voĉdoniloj: 196 Ĉiuj kandidatoj estas reelektitaj: Suzanne BOUROT: 189 v., Philippe COMBOT: 196 v., Guy DAIRON: 196 v., Danièle GOURDON: 196 v., Frédéric LE MAGADURE: 196 v., Jeannine VINCENT 190 v.

La kunveno finiĝas je la 17.30 h.

La protokolanto: P. Babin

KUNVENO DE LA KOMITATO - 19-an DE MAJO 1996

Je la 10-a horo ĉeestas: D. kaj P. Babin, P. Métivier, D. Gourdon, P. Naulet, J. Vincent, M. Noulain, F. kaj H. Boyet. Senkulpigis: S. Bourrot, B. Cheverry, P. Combet, G. Dairon, G. Lagrange, F. Le Magadure.

La ĉeestantoj unue parolas pri la rapide farotaj riparoj en la antaŭkuirejo, kie la plafono parte falis. La metiistoj devas zorgi taksu la amplekson de la necesaj laboroj. (1)

La Internacia Infan-Renkonto estis plensukcesa laŭ la laboro farita kaj la nombro da partoprenantoj. Ĉeestis 63 infanoj el tre diversaj landoj, ĉar al la 10 geknaboj el Pollando aldoniĝis, venantaj el Svedio, 24 geknaboj 15-17 jaraĵoj devenantaj el Afriko, Azio, Orienta Eŭropo. 28 junaj francoj venis el kvar urboj. Kun la akompanantaj adoltoj, la tuta loĝantaro de la kastelo superis 90 homojn. Tiu granda nombro, la tro larĝa aĝo-diferenco inter la geknaboj kaŭzis kelkajn malfacilaĵojn. Estas decidite atenti pri la nombro da partoprenantoj de ĉiu grupo invitita, pri la fakto ke pli facile estas prepari programon por ne tro malsam-aĝaj geknaboj. Malgraŭ tiuj "malfacilaĵoj" la bilanco de la Infan-Renkonto estas tre pozitiva.

Ne estas eble jam scii kiom da personoj ĉeestos la somerajn kursojn, des pli ke ĉiutage alvenas inform-petoj. Tamen oni jam povas diri, ke la nombro da eksterlandanoj estos pli granda, kaj ke la meza aĝo de la aliĝintoj iom malaltiĝas. Por 1997 la kalendaro de la staĝoj estos dividita en unusemajnajn staĝojn. La printempa Infan-Renkonto okazos de la 13-a ĝis la 20-a de Aprilo. La junia stud-periodo komenciĝos la 26an de junio kaj la lasta somera staĝo finiĝos la 24-an de aŭgusto.

Ĉar 1997 estas la centjara datreveno de la naskiĝo de Henri Micard, fondinto de la Esperanto-Domo, unu tago dum ĉiu periodo estos dediĉita al la homo, al lia vivo, al lia diversfaceta laboro. Tiuj kiuj bone konis lin bonvolos sendi kelkajn liniojn pri spertoj kun aŭ pri Micard.

Denove estas interŝanĝo de ideoj pri la gvidado de la staĝoj. La paroj, kiuj konsentas respondeci pri la someraj staĝoj ne povas ĉiujare foroferi parton de sia libertempo. Estas necese plimulti la nombron da "teamoj". La spertuloj estas pretaj helpi la novulojn.

La estraro estas rebalotita. La kunveno finiĝas je la 17-a horo.

Ĉa protokolanto: Henri Boyet

(1) - La riparoj nepre necesaj estis fakte pli gravaj; ne nur la plafono de la antaŭkuirejo falis sed ankaŭ la planko de la necesejoj kaj de la duŝejoj de la unua etaĝo.

NIA LIBRO-SERVO

Ĉiuj lernolibroj, vortaroj, romanoj..., ankaŭ la lastatempe eldonitaj, estas haveblaj. Petu la katalogon: S-ino Jeannine VINCENT, 26 bis rue de Milngavie, F-49150 BAUGE

GRAMATIKO PER BONHUMORO



DEMANDAJ ADVERBOJ

Kiam — Kial — Kiel — Kiom — Ĉu

RIM : kiam ili enkondukas dependan propozicion, ili estas **subjunkcioj** — mi ne scias, kie ili estas.

Ajn alportas nedefinitecon : kiam ajn.

KIAM = en kiu tempo :

mi tute silentos, kiam li parolos — kiam ajn vi venos, mi kore akceptos vin.

KIAL = el kia kaŭzo,

motivo : kial ne ? jen kial mi ne venis. Kial ajn vi plendos, oni ne kredos vin.

KIE = en kiu loko

Kien vi kuras ? neniu scias de kie li venis. Kien ajn vi iros, vi trovos taŭgajn bankojn.

Maljusteco :



Kial vi riprocas min ? Ne mi estas la kul-panto. Esti li la golulo !

KIEL = en kia maniero

kiel interese ! li estas punita, kiel li meritas — Kiel ajn malmulte li pagos, mi estos kontenta.

KIOM = en kia kvanto

kiom ĝi kostas ? Kiom da homoj, tiom da gusto — kiom ajn multe vi batos la aze-non, ĝi ne pli rapidos.

ĈU

esprimas demandon pri jeso aŭ neo — ĉu vi trovis la gazeton ? Ĉu vere aŭ ne ? Ĉu esti aŭ ne esti ?

Mem-edukado :



— ĉu vi ne rimarkis, la foreston de via filo ?

— Ne, tute ne, kvankam la najbaroj parolis pri agrabla silento !

Cetere, vi bone scias : obeado kaj kontrolado estas nur diktatoraj konceptoj, kaj ni tute ne volas traŭmatizi nian karuleton

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34